

# T

## Corrado TAVANTI 1919-1995



Post sia abiturienta ekzameno en 1937 T. servis en la itala armeo (1940-45), estis militkaptita en Afriko kaj transportita en usonan kampadejon en Teksaso. Post kiam en 1946 li revenis al Italio, li doktoriĝis pri politikaj sciencoj. En 1949 lin dungis biskvit-fabriko en Milano. En 1952 li translokiĝis al Svislando (Le Locle/NE), kie li laboris en ĉokolada fabriko. Pro malsano li frue emeritiĝis. Dum sia tuta vivo T. interesiĝis pri literaturo. Li verkis multajn novelojn kaj teatraĵojn en la itala lingvo – jam en la milita malliberejo estis prezentitaj du liaj komedioj. La svisromanda radio disaŭdigis naŭ liajn krimromanojn, la svisitala radio kvar. Fine de la 1980aj jaroj T. skribis italan romanon pri la etruskoj (*La Menervale*), kiu tamen ne trovis eldoniston.

T. konatiĝis kun Eo en 1937. Post interrompo, jam emerita, li ree dediĉis sin al ĝia lernado per kurso de KCE. Precipe la amikeco kun →Henri Vatré kaj la kunlaboro kun Kooperativo de →Literaturo Foiro stimulis lian literaturan verkadon. Lia krimromano *Var-*

*mas en Romo* (1986) ricevis la ‘premion Argus’ de LF-koop (en 1988 ĝi eĉ aperis en hungara traduko en ĉ. 100'000 ekzempleroj). Lia dua romano *Tiu toskana septembro* (1990) estas Eo-adapto de itallingva manuskripto fare de la hungara e-isto István Ertl kaj aprobita de la aŭtoro. T. havis almenaŭ unu plian roman-manuskripton preta: *Tiu malbenita atenco ĉe la Tri Fazanoj* - la unua ĉapitro aperis iam en la 1980aj jaroj en LF.



## TICINO

Kantono en suda Svislando itallingva (itallingve: Ticino, mallong. TI: 2812 km<sup>2</sup>, 322'600 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Bellinzona (laŭ PIV: Belinzono).

La unua adreso de tiĉina e-isto estis publikiĝita en la 12a nomaro de SES en 1904: temas pri J. Ulrich Müller, naturkuracisto en Castagnola. En 1908 Paul Humberst el Le Locle/NE prelegis pri Eo en Belinzono. La loka gazetaro raportis. La starigo de la *belinzona* EG sub la prezido de Nina Burkhard-Patacchi datas el 1919.

Kelkajn jarojn antaŭe, la 20an de aŭgusto 1915, fondiĝis EG *Lugano* kun 16 adeptoj kaj 13 aprobantoj (tiel nomiĝis la oficialaj kategorioj). La unua prezidanto Isella Firmino estis asistata de sekretario Charley Weilbacher. UEA-delegito en Lugano estis dum multaj jaroj la pentristo Carlo Bassi. Biografiaj indikoj pri tiuj personoj mankas.

En la 1920aj jaroj, *Stefano Pedrazzini*, filo de iama urbestro de Locarno kaj deputito de la tiĉina parlamento (Giovanni Pedrazzini), oficis kiel UEA-delegito en tiu tiĉina urbo, kie li klopodis starigi Eo-komitaton. La hotelo Belvedere en Locarno ofertis specialajn prezojn por e-istoj, ekfunkciis *Tiĉina Eo-Muzeo* kaj Rondiranta Ekspozicio (1920), kaj kelkaj komercaj firmaoj en Locarno kaj Lugano utiligis Eon. Same en 1919 oni trovas unuafoje la nomon de *Irene Molinari* (1896-1994), instruistino en (iamaj) popolaj mezlernejoj kaj en duagrada lernejoj en T.; ŝi estis membrino de la *lokarna* EG kaj Eo-

instruistino. Kun Agnese Cotti (la patrino de la iama konfederacia konsilisto Flavio Cotti), kiu estis ŝia amikino, Molinari apartenis al la tiĉina kantona estraro de la Asocio por la virina voĉrajto (1946-71). Ankaŭ dank' al la aktiveco de *Carlo Gilà* (1885-1969), direktoro de limonado-fabriko, asekuristo kaj tiĉina reprezentanto de la svisa aŭtomobil-klubo, kiu estis membro de la lokarna EG, dumviva membro de UEA kaj ĝia delegito dum la 20aj jaroj en Locarno, Eo fariĝis iom populara en la regiono. 1933-45 →Edmond Privat instruis la anglan lingvon en la supera komerca lernejo en Belinzono, loĝante en Locarno. Lia disĉiplo estis *Pierre Métivier* (+2005), kiu longe loĝis en Ascona kiel flegisto-ĝardenisto, kaj kiu estis pacaktivulo kaj e-isto antaŭ ol forlasi Tn. por ekloĝi en Francio.

La Svisaj Eo-Tagoj de 1943 (28a de aprilo ĝis 2a de majo) okazis en Ascona kaj Locarno. La detala raporto pri tiu aranĝo estis publikigita en SE 3/1943.

En 1962 ekloĝis en Locarno *Etty Graeffe* (1897-1969), kiu laboris kiel instruistino en multaj eŭropaj landoj. Dum la dua mondmilito ŝi translokiĝis al Usono kaj iĝis ties ŝtatanino. Locarno, kie ŝi forpasis, estis taŭga loko por kormalsanulino. Graeffe kunorganizis plurajn Eo-kursojn kaj aliajn aranĝojn en T., havante je sia dispono vastan amikaron, aparte inter la bahaanoj.

En 1963 mortis en T. *Paolo Rumpel* (\*1882), eksdocento pri internacia juro kaj lingvoj de la neŭŝatela universitato kaj direktoro de Instituto Montebello en Castagnola/TI. Li favore parolis pri Eo, kiun li lernis dum siaj studentaj jaroj, aparte emfazante ĝian gravecon por la radio. Dum multaj jaroj en la telefonlibro de Lugano/TI apud la adreso de Rumpel estis indikita 'Eo-servo'.

En la 1970-80aj jaroj ekzistis en Locarno la *Grupo E-ista de Locarno (GRESLO)* sub la gvido de *Alfonsito Varini* (1924-1996). Varini estis konata kaj aktiva personeco en sia regiono, kiu laboris por la firmao Shell, li estis prezidanto de la fondaĵo Pro Locarno kaj aktivulo en la komercista societo. Lia Eo-kolego →*Dante Bertolini* (1911-1998) estis publike ne malpli konata kaj respektata kiel instruisto, lerneja inspektoro, politikisto kaj itallingva verkisto. Kiel vicprezidanto de GRESLO Bertolini instruadis Eon en diversaj

lernejoj, jen por infanoj, jen por plenkreskuloj. Dank' al la klopodoj de Bertolini kaj Varini, en Solduno (kvartalo de Locarno) la 27an de aprilo 1985 povis esti inaŭgurita *Piazzetta Esperanto*, la unua Eo-placo en Svislando. La tiĉina gazetaro detale raportis pri tiu evento. Ankaŭ *Mattea Sormani* (1916-2003), kiu lernis Eon dum pluraj staĝoj kaj fakaj/migradaj restadoj en KCE, estis tre aktiva membrino en la lokarna EG, ĉefe en la unua duono de la 1990aj jaroj.



Inaŭguro de la Eo-Placo en Solduno, maldekstre staras Arhur Baur



Alfonsito Varini

*Tiĉina Eo-Ligo*: La kerno de la poresperanta agado en T. ekde de la mezo de la 1950aj jaroj fakte troviĝas en la fervojista medio. Reveninte entuziasme de la 7a IFEF-kongreso en Zuriko (1955), *Giovanni Sasselli* (1904-72), mekanikisto kaj lokomotivestro ĉe la svisaj fervojoj (SFF), komencis vaste propagandi Eon en sia kantono. Kun siaj loko-

motivestraj kolegoj *Enea Albertini* (1926-90) kaj →*Kurt Greutert* (\*1927), *Sasselli* formis la bazon de la SAEF-grupo en Belinzono, kiu malfermis sin ankaŭ al la nefervojoj el la tuta kanton kaj rekte kondukis al la fondo de *Tiĉina Eo-Ligo (TEL)* en 1961. Dum *Albertini* servis al TEL kiel kasisto ĝis 1985, kiel unua prezidanto de TEL estis elektita *Enrico Balmelli* (\*1917). *Balmelli* estas emerita lokomotivestro ital-devena, kiu prezidis la sekcion LPV (lokomotivestroj) de Belinzono-Biasca. Kiel aktiva politikisto en Belinzono li okupis la oficon de urba konsiliano kaj membro de la plenuma instanco (1968-72). Post sia emeritiĝo li ekverkis, hobinivele, en la itala lingvo, du romanojn: unu el ili estis disaŭdigita de la tiĉina radio en 1985, kaj la alia aperis felietone en la gazeto *Libera Stampa* (1991). Esence kontribuis al la ellaborado de Eo-lerniloj krom *Balmelli*, kiu verkis deklecionan korespondan Eo-kurson por komencantoj itallingvaj, ankaŭ alia aktivo de TEL: *Fernando de Faveri* (\*1926), emerita SFF-mekanikisto kaj eksa membro de la urba konsilio de Belinzono kaj de la tiĉina kantona parlamento.


Ankaŭ *Eugenio Boggio* (1902-73), elektroteknikisto kun vicdirektora funkcio en Belinzono, apartenis al la membroj de TEL, sed ankaŭ al SES kaj UEA. Sian tutan libertempon *Boggio* dediĉis al idealismaj organizoj. Nur post la emeritiĝo li okupiĝis pri Eo kaj organizis diversajn agadojn en T. Malgraŭ modestaj Eo-lingvokonaj informadaj pri Eo en lernejoj, en framasonaj kaj bahaaj medioj.

Alia membro de la belinzona EG nomiĝis *Robert Kreienbühl* (\*1923) en Agarone/TI, alemana komerca instruisto kaj emerita bankoficisto.

Meze de la 1970aj jaroj TEL registris ĉ. 120 membrojn kaj simpatiantojn. 1974-79 la asocio eldonis propran bultenon kun la titolo *Tiĉina Informilo*; ĝi estis anstataŭita de la revuoj →*Lombarda E-isto* (1981-86) kaj poste de *Lingua Verde*, eldonitaj de →LF-koop, kies ĉefaj gvidantoj →*Giorgio Silfer* (\*1949) kaj →*Perla Martinelli* (\*1938) dum multaj jaroj loĝis en Chiasso TI kaj Milano (Italio).



Enrico Balmelli, Enea Albertini, Giovanni Sasselli



Edo Tognini, Kurt Greutert kaj Robert Kreienbühl



Dante Bertolini, Tazio Carlevaro kaj Giorgio Silfer

En 1972 okazis la 24a IFEF-kongreso en Lugano. La tiĉina urbo anstataŭis Pragon, kie la kongreso ne povis okazi kiel antaŭvidite pro politikaj kialoj. Tial SAEF decidis transpreni la organizadon. Prezidanto de LKK estis plia konata tiĉina politikisto: *Edo Tognini* (\*1927). En la kantona komerca lernejo en Belinzono *Tognini* estis lernanto de Edmond Privat. Kiel iama multjara fervojpersonara sindikatisto kaj emerita bankdirektoro *Tognini* membris, kiel de *Faveri*, en la belinzona urba konsilio kaj membris en la tiĉina kantona parlamento, kiun li eĉ vicprezidis kaj kie li ankaŭ prezentis proponon esplori la eblon enkonduki la eksperimentan instruadon de Eo en la tiĉinajn lernejojn.

Dum la 1970-90aj jaroj pri la organizado de la regionaj semajnfinoj respondecis antaŭ ĉio →*Tazio Carlevaro* (\*1945), konata kuracisto en Belinzono, renoma esperantologo kaj interlingvisto. Li estis la lasta prezidinto de

TEL antaŭ ĝia malfondo. En 1997 la bulteno *SES informas*, n-ro 3, anoncis, ke la kultura Eo-semajnfino, aranĝita de 1974 en T., dume ne plu okazos pro interesomanko kaj ke la belinzona EG ĉesis ekzisti. TEL malfondiĝis oficiale en 1997, ĝia tuta havaĵo estis transdonita al SES.

### TRANSALPA ESPERANTISTO


Eo-periodaĵo eldonita de Laŭzana Eo-Societo (LES) kaj Kooperativo de →Literatura Foiro (LF-koop) en La Chaux-de-Fonds (1981-83), Genève (1982-83), Belinzono (1984-87). Redaktis ĝin →Nicole Margot, →Giorgio Silber, Arlette Di Vetta-Mouron, Jean-Daniel Bosko, Suzanne Bourot.  
→Bibliografio (gazetaro)



### TURGOVIO

Kantono en nordorienta Svislando germanlingva (germanlingve: Thurgau, mallong. TG: 991 km<sup>2</sup>, 234'100 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Frauenfeld. (La toponimo Turgovio ne ekzistas en PIV).

En 1904 la 81-jara J. Debrunner en Oberhofen/TG prelegis pri Eo en la instruista societo. En 1906 *Svisa Espero (SE)* anoncis la fondon de malgranda junulara EK en *Weinfelden/TG*, kiu estiĝis pro la iniciatemo de samideano Albrecht el Winterthur. Fine de 1907 SES registris dek adresojn en T. kaj en 1910 *SE* eĉ menciis la fondon de EK en *Kreuzlingen* sub la influo de la grizonano E. Capeder. En la 1950aj jaroj oficis kiel UEA-delegito en Frauenfeld la bankoficisto Ernst Brenner (1887- ?), kiu aliĝis al la Eo-movado en 1935.



Iama Esperantoweg en Romanshorn

Aparte menciindas la urbo *Romanshorn*, kie la Eo-movado ekestis en 1931, kiam *Gottlieb Stäheli* (1879-1941), fervoja oficisto, gvidis kurson partoprenatan de dek personoj. La EG St. Gallen sub la gvido de →Hans Kürsteiner agnoskis tiun iniciaton kaj provizis la e-istojn en Romanshorn per la ŝatata rumana Cseh-instruisto Tiberio Morariu por deksemajna kurso de po du lecionoj semajne. Post tiu kurso, pri kiu intertempe interesiĝis 20 personoj, fondiĝis EK *La Verda Stelo*. Kiam pluraj membroj devis forlasi la urbon pro profesiaj kialoj, en 1936 la EK, kies 14-16 anoj regule kunvenadis dum deko da jaroj, estis malfondita. Poste la Eo-vivo en Romanshorn apenaŭ revigliĝis - kelkaj iamaj Eo-kursanoj ja restis, sed evidente ne emis relerni Eon.

*Fritz Schwab* (1883-1968) estis dum 35 jaroj membro de SES kaj UEA-delegito en Romanshorn (fine de la 1930aj jaroj).

La plej signifa loka e-isto en Romanshorn nomiĝis →*Otto Walder* (1912-88), kiu fariĝis e-isto en sia junaĝo (1932) kaj restis duonjarcenton aktiva en la Eo-movado en plej diversaj funkcioj, ekzemple kiel kasisto de la loka EK. En sia Eo-aktiveco Walder estis helpata de sia edzino *Elsbeth Walder-Guggenbühl* (\*1919), kiu estis ankaŭ aktiva anino de la protestanta eklezio kaj de KELI (de 1952).

La movadaj kulminoj de Eo en Romanshorn estis la regiona kunveno de SES en 1957, la prelego de la japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino antaŭ 140 personoj en 1959 kaj la trilanda rekontiĝo en 1965, kiam estis inaŭgurita la strato *Esperantoweg* ĉe la loĝadreso de Walder.

La arkitekto *Franz Rispy* (1903-1972), UEA-delegito en Amriswil ekde la 1930aj jaroj, aktivis post la dua mondmilito kadre de la mem iniciatita nacia komitato por la lukto kontraŭ la aliĝo de junaj svisoj al la Fremdula Legio. Senkonsidere al la minacoj de la franca justico, li rekondukis patrolanden junajn samlandanojn varbitajn de la fremdula legio en Nordafriko kaj fondis libervolajn labor-tendarojn en Tiĉino, en kiu problemaj gejunuloj trovis ŝirmon kaj prizorgon. Siajn spertojn kaj aventurojn li priskribis en pluraj verkaĵoj. En la 1940aj jaroj Rispy aktivis en SES kiel ĝia vicprezidanto (1946) kaj kiel organizanto de regiona kunveno de SES.

La franco *Paul Le Brun* (1876-1956) en Kreuzlingen estris franc-anglan ŝipkompanion, dum multaj jaroj li laboris en Londono kaj en 1945 translokiĝis al T. En Svislando li okupiĝis precipe pri la Eo-literaturo. Krom aliaj verkoj, li kuntradukis la libron *Ce la sanktaj akvoj* de J.C. Heer kaj *Tartarin de Taraskono* de Alphonse Daudet en Eon.

→ *Walter Kobelt* (\*1910) loĝas en Arbon/TG.

## TURISMO

Eo kaj T. estas senpere kunligitaj i.a. pro la vojaĝemo de la e-istoj kaj la praktikaj servoj, kiujn Eo povas disponigi dum la vojaĝado. Elstara ekzemplo de turista aktiveco estas la ĉiujaraj naciaj kaj internaciaj kongresoj, kiujn la e-istaro organizas kaj vizitas.

Komence de la historio de la svisa Eo-movado troviĝas kelkaj iniciatoj apliki Eon en T. Kiel ekzemplo eblas mencii la t.n. *Internacian Esperantan Paradizon*, kiu instaligis en 1908 en Meggen apud Lucerno, kaj kiu evidente fariĝis bone vizitata feriejo de la e-istoj.

En januaro 1909 *Svisa Espero* anoncis la ekziston de la t.n. *Eldorado* en Adelboden. Pri tiu feriejo mankas precizaj informoj kaj raportoj (sed Claude Gacond poste rakontis, ke en la periodo kiam li organizis la skiferiojn de EJS/EES en la ĉaledo en Boderlen, Adelboden, do en la dua duono de la 50aj jaroj, kelkaj maljunuloj en la vilaĝo ankoraŭ memoris pri la aktiveco de la e-ista apotekisto Theodor Hopf, kiu mortis en 1919).



Turisma gvidilo de Oscar Hopf en Thun



Eo-prospekto pri Svislando en la traduko de Jules Perlet, 1925

Dank' al la klopodoj de *Emma Herzog* (1857-1920) en la grizona sport- kaj kuracloko Davos/GR ekestis ĝermoj de e-ista T. La vilaĝo Château d'Oex/VD en la Vaŭdaj Alpoj estis vizitata de e-istoj pro la ĉeesto de → *René de Saussure* (1868-1943).

Precipe la ĵurnalisto → *Hans-Joachim Unger* (1894-1984) aktive kaj profesie okupiĝis pri la lingva problemo en T. Kiel ĉefredaktoro de la periodaĵoj *Die Reise* kaj *Welt auf Reisen* kaj kiel prezidanto de Svisa Unio de turismaj ĵurnalistoj, ankaŭ en la Eo-movado Unger rolis kiel redaktoro de diversaj Eo-periodaĵoj ligitaj kun komerco, T. kaj Eo-propagando, ekz. *Internacia Komerca Revuo* (Zürich 1919-22), *Internacia Komerco* (kiel aldonaĵo de *Eo Triumfonta*; redaktita kun Robert Kreuz; marto 1923 ĝis oktobro 1924), *Esperanto-Press* (Zürich 1943-49), *Turista Mondo* (aperis kvaronjare 1969-72, riĉe ilustrita en sufiĉe alta eldonkvanto).

Internacia Turista Asocio La Naturamikoj (TANEF) oficialigis Eon en 1965.

Diversaj Eo-aranĝoj kiel la dusemajna lingvoferiado en → *Kastelo Münchenwiler* (1954-

61), la *Skiferioj de EJS kaj EES* en Adelboden (1954-78), la *Eŭropa Feria Semajno de SAEF* (1959-77), sed ankaŭ la ekskursoj de TANEF kaj la aranĝoj de la kristanoj (KELI k.a.) plenumis signifajn turismajn funkciojn. Pro la ekzisto de →*Kultura Centro Esperantista* (KCE/GEP) en La Chaux-de-Fonds ekde de 1970aj jaroj multaj svisaj kaj eksterlandaj e-istoj vojaĝis al la ĵurasa regiono. Pluraj svisoj estis ankaŭ UEA-(fak-)delegitoj pri T. La *Jarlibro* de UEA utile servas ĝis nun kiel akompana libro dum vojaĝoj (pri la celaro de la *Jarlibro* en la T. legu la konceran tekston en la eldono de 1911).



Kolora Esperantoo-prospekto pri Svislando, 1935

## Olivier TZAUT

\*1935. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE




Post siaj studoj pri violono kaj solfeĝo en la konservatorio de Nîmes (Francio) T., kiu naskiĝis en Parizo, kleriĝis pri kantarto kaj gitaro en Svislando kaj longe laboris kiel instruisto en la elementa (baza) lernejo de Mont-Soleil en la Berna Ĵuraso, de 1977 duontempe. Dum dudeko da jaroj li gvidis virhoron kaj mem kantadis en diversaj horoj. Kiel e-isto de 1965 T. administris la Kampanjon Eo lernejen de KCE, kaj en la 70aj jaroj li estis prezidanto de EES (→Instruado). La e-istaro, svisa kaj tutmonda, konas lin precipe kiel Eo-kanzoniston, kies kantoj apartenas al la klasikaĵoj de la Eo-muzik-kulturo. Liaj diskoj kaj kasedoj estis unue mem eldonitaj, poste reeldonitaj de Kooperativo de →Literatura Foiro: La 33-turna vinildisko *Tra l'mondo* (1977) prezentas ĉarmajn popolkantojn el diversaj landoj, plejparte tradukitajn de →Claude Piron, dum *Karnavaletto* (1981), disko kaj kasedo produktita kunlabore kun Gianfranco Molle, konsistas el originalaj kaj tradukitaj kantoj. Krom tio T. kunlaboris en aliaj projektoj, ekzemple kiel laŭtleĝanto de tekstoj por *Nouveau cours rationnel et complet d'Espéranto* (SAT-Amikaro, Parizo 1980). Iom post iom T. retiriĝis de la aktiva Eo-agado. En marto 2005 T. regalis la lernejon La Grande Ourse en La Chaux-de-Fonds per siaj ankoraŭ nun ŝatataj kantoj. Aleksej Birjulin skribis en *OdEo* (3/1992) pri la kantoj de T., pri *Karnavaletto* kaj *Tra l'mondo* de T. (kaj pri *Frandu Piron* de Claude Piron), ke ili „prezentis vere internacian spektron de popol-kanzonoj muzike prilaboritaj sen ajna tromodernigo, kun akompano minimuma, preskaŭ avara, sed

kun muzika tekniko kaj aranĝado polurita ĝis perfekte.“


T. plurfoje renkontis la usonan ĉerokon kaj e-iston Billy Ray Waldon (N.I. Sequoyah / Sekvojo), kiu estis kondamnita al mortpuno, en sia prizono.

→Instruado de Esperanto en Svislando

→Kultura Centro Esperantista



Tzaut prezentas sin sur la disko *Tra l'Mondo*



Tzaut kantas en 2005 (fotis M. Molnár)

# U

## **Friedrich (Fritz) UHLMANN**

1881-1938



Post la gimnazioj en Burgdorf/BE kaj Berno, medicinaj studoj en la universitatoj de Berno, Zuriko, Bruselo kaj Parizo kun studrestado en Halle (Germanio), U. ricevis en 1906 la ŝtatan diplomon kaj en 1907 doktoriĝis pri fiziologia temo. Poste li laboris kiel kuracisto en Huttwil/BE (ĝis ĉ. 1910), kiel psikiatro en la sanatorioj de Küssnacht/ZH, Schussenried (Virtembergo, Germanio) kaj en Zihlschlacht/TG. En 1916 li ŝanĝis al la kemia industrio en Bazelo (Ciba) kiel medicina asistento, avancante kiel prokuristo kaj estro de la biologia kaj farmakologia sekcio de Ciba. En 1918 li fariĝis privatdocento pri farmakologio en la berna universitato. U. aŭtoris pli ol 50 gravajn verkaĵojn pri psikiatrio kaj farmakologio, inkluzive de lernolibro pri farmakoterapio. Kiel kuracisto U. okupis la kapitanan gradon de la svisa armeo. U. membris en diversaj komisionoj, ekzemple en la supera konsilio de la skota rito kaj de la berna societo Singstudenten. En 1912 li fariĝis framasono en la loĝio Karl zu den drei Ulmen en Ulm (Germanio), en 1977 li membriĝis en la bazela loĝio Freundschaft

und Beständigkeit. En 1922 li kunfondis kaj sekve estris la duan bazelan loĝion Zum Fels am Rhein kaj en 1931 mem starigis kaj gvidis la trian bazelan loĝion Osiris. En la svisa grandloĝio Alpina U. rolis kiel grandmajstro, en Universala Framasona Ligo kaj en la Internacia Framasona Asocio (AMI) kiel prezidanto.



Uhlmann inter Hector Hodler kaj Paul Humberset en Soloturno, 1909

En la unua fazo de sia Eo-agado U. aktivis en la berna kanton, loĝante en Huttwil/BE, kiel membro de la loka EG kaj kiel ĉefredaktoro de la profesie produktata Eo-periodaĵo *Vespera Horo* (Huttwil 1910). Lia prelego en Burgdorf en 1909 kontribuis al la fondo de la loka EG. Samtempe li apartenis al la CK de SES kaj prezidis ĝian propagandan fakon. Krome li kunlaboris kun la gazetoj *Esperanto* (UEA), *Monda Poŝto*, *Internacia Medicina Revuo*, tradukis poemojn (ekz. de H. Seidel), esperantigis la verkon *Kulturceladoj de la nuntempo* de →Auguste Forel (1911) kaj kompilis lernolibron (*Vollständiges Volks-Lehrbuch der Esperanto-Sprache*) eldonitan de Svisa Esperanta Eldonejo en Langenthal en 1909; la akompanan ŝlosilon verkis Emma Herzog (Dresdono 1911). U. kunlaboris kun



Forel kadre de la Ordeno por Etiko kaj Kulturo (IOEK), societo iniciatita de Forel celanta la etikan socialan progreson, spiritan liberecon kaj civilizecon sen partipolitika influo. De U. originas ankaŭ la vortaro por la Ruĝa Kruco *Deutsch-Esperanto-Wörterbuch für das Rote Kreuz* (Schussenried 1913). En 1914 U. portempe retiriĝis de la movado por poste reaperi en 1919 en Bazelo i.a. kiel organizanto de Eo-ekspozicio dum la bazela Specimena Foiro, kiel preleganto pri Eo ĉe bazelaj kaj zurikaj framasonoj kaj kiel kunlaboranto de SES kiel ano de ĝia gazeta komitato.

→Bernio →Bazelo →Ĵurnalismo →Ruĝa Kruco  
→Auguste Forel →Svisa Eo-Societo

### **Hans-Joachim UNGER**

1894-1984



U. estis german-devena ĵurnalisto kun doktora titolo, redaktoro de la periodaĵo *Die Reise* (1950aj jaroj) kaj ĉefredaktoro de *Welt auf Reisen* (1906aj jaroj). Li propagandis kulturan vojaĝadon kiel parton de la humanisma kulturo. Li estis prezidanto de Svisa Unio de turismaj ĵurnalistoj kaj membro de Internacia Akademio de Turismo.

En la Eo-movado U. elstaris kiel redaktoro de diversaj Eo-periodaĵoj ligitaj kun komerco, turismo kaj Eo-propagando: *Internacia Komerc Revuo* (Zuriko 1919-22), *Internacia Komerc* (kiel aldonajo de *Eo Triumfonta*; redaktita kun Robert Kreuz; marto 1923 ĝis oktobro 1924), *Esperanto-Press* (Zürich 1943-49), *Turista Mondo* (aperis kvaronjare 1969-72, riĉe ilustrita en sufiĉe alta eldonkvantoj). U. redaktis Eo-rubrikojn por diversaj gazetoj, i.a. *Schweizer Bürgerzeitung*. Al la

zurika ES li servis kiel bibliotekisto kaj prezidanto (1915), krome li estis ano de la gazeta komitato de SES, sed li iniciatis ankaŭ la svisan sekcion de IKUE (1913) kaj verkis broŝureton pri Albanio (1923). La fontoj rakontas pri iu incidento kun Reinhard Heydrich, la ĉefo de la nacisocialisma polico kaj gvidanto de SS, kies suspekton kontraŭ Eo kiel eltrovaĵo de judo U. persone spertis kiam li rolis Berlino kiel kunlaboranto de la gazetara agentejo Associated Press. Nome post esta renkontiĝo en berlina kafejo U. estis vokita al la oficejo de Gestapo, kie Heydrich persone kulpigis lin organizi „internacian reton“ kontraŭ la Tria Regno helpe de la estoj. Similajn riproĉojn U. poste aŭdis de Rudolf Hess, la lasta anstataŭanto de Adolf Hitler, kiu ŝajne revis pri iu simpligita germana lingvo, altrudenda al la tuteŭropa ŝtata federacio sub nacisocialisma hegemonio. Nelonge post tiuj okazaĵoj eksplodis la dua mondmilito.

→Ĵurnalismo →Kristanoj →Turismo →Zuriko

### **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA, svisa periodo)**

En la antaŭhistorio de U. la temoj de la organizaj strukturoj de la Eo-movado okupis la estoj kaj precipe L.L. Zamenhof jam delonge. Jam en 1889 Zamenhof sugestis la fondon de *Tutmonda Ligo de E-istoj* (vd. *La Esperantisto*, n-ro 3), kaj iom poste aperis regularo de *Ligo Internacia de E-istoj*. Kiam tiuj ideoj fiaskis, Zamenhof proponis en 1893 *Internacian Ligon E-istan*, sed ankaŭ tiu sugesto restis nur ideo. En 1898 aperis en Francio La Societo por la Propagando de Eo kiel formale internacia organizo kun individuaj membroj. Ĝia iniciatinto estis Louis de Beaufront (Chevreux), kiu ornamis sian societon per la nomoj de eminentuloj. Aliflanke Théophile Cart, alia franca ‘oligarko’ de la tiama Eo-movado, montriĝis rigora kontraŭulo de ajna internacia organizaĵo. Kaj tute izolita grupo ĉirkaŭ Alfred Michaux, Hector Hodler k.a. celis al demokrata, simpla, servopreta, efika organiziĝo kun propagandaj trajtoj kaj praktikaj-turismaj servoj.

La zamenhofaj ideoj pri Tutmonda Ligo E-ista fariĝis tagordero de la unua kongreso esta en Boulogne-sur-Mer en 1905, tamen la

kongreso ne naskis tutmondan organizon e-istan, ĉefe ĉar ĉiuj inter si rivalaj estroj, kiuj regis la Eo-movadon, volis eviti, ke la alia fondu tian. Tamen povis esti enkondukita almenaŭ la starigo de la Lingva Komitato. Tuj post la bulonja kongreso komencis funkcii, kun la klopodo de generalo Hyppolite Sebert kaj Emile Javal kaj la subteno de Zamenhof, E-ista Centra Oficejo en Parizo (ĝi ĉesis funkcii en 1923), kiu ludis la rolon de teknika sekretario sen rajtigoj flanke de la naciaj societoj.

Dum la 2a UK en 1906 en Ĝenevo, la urbo de la Ruĝa Kruco, Alphonse Carles (+1930) proponis la starigon de reto de Eo-konsuloj en ĉiuj urboj kiel organiza sistemo; alia franca e-isto, Théophile Rousseau (1876-1916), sugestis la fondon de Eo-oficejoj. La revuo *Esperanto*, lanĉita kiel propaganda gazeto en 1906 far Paul Berthelot en Ĝenevo, estis ekredaktata de →Hector Hodler (1887-1920) komence de 1907; en 1908 ĝi fariĝis la organo de U. kaj estis ĝis lia morto en la posedo de Hodler. Ĝin li redaktis 13 jarojn ĝis sia morto, krom ses monatoj en 1914 dum la unua mondmilito. Ĝi ankoraŭ nuntempe aperas kiel asocia organo de U.

Hector Hodler, filo de la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918), montris sin tre interesata pri la ideo de la konsula reto kaj sekve eklaboris por la efektivigo de la projekto, en kiu li vidis realigebla sian planon, nome krei ilon por organizi reciprokan helpon inter bonvolaj homoj diversnaciaj.

Ne forgesenda estas en ĉi tiu kunteksto ankaŭ la Delegacio por alpreno de lingvo internacia, kiu estis iniciatita dum la monda ekspozicio en Parizo en 1900 fare de Louis Couturat kaj Léopold Leau. Ĝia agado evoluis pli kaj pli en la direkto de lingvaj reformoj en Eo, ĝis ĝiaj protagonistoj favoris la propagandon de la reformlingvo →Ido, enkondukante la t.n. Ido-skismon de 1907/8.

→Edmond Privat (1889-1962), kiu en 1903 fondis kun Hodler en Ĝenevo la gazeton *La Juna E-isto*, skribis en sia *Historio de la Lingvo Esperanto* (1a eld. 1912), ke „la plej grava kaj pozitiva rezulto de la ‘Delegacia krizo’ estis sendube la fondo de U.” Kiel Privat ankaŭ raportis, Hodler estis forte impresata pri la konflikto rilate la kompetente-

cojn inter Delegacio, Lingva Komitato, d-ro Zamenhof, kongreso ktp. Samtempe sentante sin nekontenta pri tiu situacio, Hodler sugestis organizi efektivan reprezentantaron de la e-istoj sen konkurenci la ekzistantajn Eo-organizaĵojn kaj por ne okupiĝi pri lingvaj demandoj, sed celi sole la organizadon de la praktika uzado de Eo. Tiel Hodler volis savi la e-istojn el teoriaĵoj kaj instigi ilin transiri de gramatikaj diskutoj al praktika agado, formante e-istan popolon de *Esperantio*, kiu estas inter si ligita per la t.n. ‘interna ideo’ kaj la sento de la solidareco helpi unu al aliaj kaj inter si reciproke, por inaŭguri novan periodon de efektiva uzado de la lingvo kaj realigi la noblajn idealojn de L.L. Zamenhof. (→Antologio)

U. kiel organizaĵo de individuaj e-istoj oficiale fondiĝis la 28an de aprilo 1908, la komuniko mem pri la starigo de U. sekvis en *Esperanto* la 1an de majo 1908. La unua prezidanto de U. fariĝis Harold Bolingbroke Mudie (1880-1916) el Britio. 1916-19 la posteno por la U.-prezidanteco vakis, ĝis en 1919 Hodler mem transprenis ĝin.



Hector Hodler, René de Saussure, Eduard Stettler

U. deklaris sin asocio kun celo ideal(ism)a kaj je nelimigita daŭro, konforme al artikolo 60 de la Svisa Civilkodo; laŭstatute U. „celas la plifaciligon de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreon de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj”; la asocio difinis sin absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco. „Krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio”, do servi al siaj membroj estis la ĉefa principo de U. La Centra Oficejo (CO) de U. estis oficiale nomita Internacia Esperanto-Oficejo. Ĝenevo estis bonvena kiel urbo situanta en la neŭtrala

ŝtato Svislando. Jam en aŭgusto 1908 U. havis 200 delegitojn, 80 vicdelegitojn, 2100 subdelegitojn kaj 1300 pagantajn membrojn. Pri kio Zamenhof malsukcesis – tion atingis Hodler kaj liaj amikoj. Pro tio Zamenhof gratulis al Hodler en letero de julio 1908 per jenaj vortoj: „Kara sinjoro! ... La rapida kaj bonega disvolviĝo de la U. min tre ĝojigas, kaj mi esperas de via Asocio tre multe da bono por nia tuta afero. Mi kore deziras al U. la plej bonajn sukcesojn...“ Samtempe L.L. Zamenhof fariĝis honora prezidanto de U.



Membrokarto de UEA en 1908

Dum la solena malferma kunveno de la dresdena UK en aŭgusto 1908 la U.-fondinto Hodler detale klarigis siajn ideojn kaj la taskojn de la estonta tegmenta organizo (la teksto aperis en *Esperanto*; → Antologio). Laŭ la iniciatintoj, la fondo de U. celis konkurenco nek la Lingvan Komitato, nek la Kongresojn, nek la Centran Oficejon E-istan en Parizo, gravaj e-istaj institucioj, kiuj tiam jam ekzistis.

En la nova asocio Hodler vidis esti realigita la internan ideon kaj „taŭgan neŭtralan fundamenton por ĉiuj interhomaj rilatoj kaj servoj“, kaj li estis konvinkita, ke „el tiu ĉi reciproka sinhelpado rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj, kaj foriĝos la baroj, kiuj malhelpas ilian pacan interkomunikiĝon“ (*Esperanto*, n-ro 62/1909). Hodler komencis jam dum la milito skizi siajn imagojn pri la nova socio, kiu reorganizu la vivon en pli paca kaj pli demokratia mondo. (→ Antologio) U. pruviĝis do kiel modelo por la internacia solidareco, kiu estis praktikata dum la milito per vasta helpagado favore al la militviktimoj en Eŭropo, dank’ al la situo de la CO de U.

en Ĝenevo sur la teritorio de la neŭtrala Svislando. Antaŭvidante kolektivismajn tendencojn kaj la pliakriĝon de la klasbatalo, Hodler vidis en la e-istaro „la embrion de tiuj elitoj“, kiuj super la naciaj ruinoj konstruu novan, internacian domon.



Titolpaĝo de la *Oficiala Jarlibro* en 1914

*Oficejoj de U.:* La unua oficejo de U. estis instalita en strato *Bovy-Lysberg 8* en Ĝenevo de → *René de Saussure* (1868-1943), kiu vigle interesiĝis pri Eo sekve al sia partopreno en la dua UK en 1906. En tiu jaro li malfermis ĉe la menciita adreso propagandan-sciencan oficejon. Hodler helpis al li tie kiel sekretario antaŭ ol fariĝi posedanto de *Esperanto* kontraŭ la pago de „kelkaj penplene de li ŝparitaj centfrankoj“ kaj kiel unua (honorofica) direktoro de U. (en 1910). „La redaktejo kaj la unua oficejo de U. troviĝis en ĉambreto treege modesta ludonita de s-ro de Saussure“, skribis → *Eduard Stettler* (1880-1940) en sia leginda monografieto *Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko* (1928). Ankaŭ dank’ al de Saussure estis trovita kaj luprenita la posta oficejo en la proksima strato *Rue de la Bourse 10* (*Borsa Strato*), kien la Centra Oficejo de la

rapide kreskanta asocio en 1909 translokiĝis kaj restis ĝis 1919. En 1913 de Saussure forveturis al Berno, kie ekde tiu jaro cetere estis presata la revuo *Esperanto* post rezigno pri diversaj aventuroj kun fuŝpresistoj en Francio.



Strato Bovy-Lysberg 8 en Ĝenevo, en la fono estas videbla Victoria Hall (fotis A. Künzli)

Pri la rilatoj inter Hodler kaj de Saussure Stettler notis en sia libro jenon: „La deveno, eduko kaj karaktero de ambaŭ homoj estis tro diversaj, por ke el la samideanaj rilatoj kreiĝu amikeco. Hodler vidis grande, li volis realigi la ideojn de Zamenhof per la praktiko, dum s-ron de Saussure interesis tiam kiel ĉiam detaloj de la lingvo kaj gramatiko.“ Tamen la materia kontribuo de de Saussure estis bona kaj esenca, kiel Stettler emfazis, ĉar tiel multe povis esti rekompencata la avareco de la tre monŝparema Hodler, pro kio Stettler montris sin tre dankema al de Saussure.

Ĉirkaŭ la jaroj 1909-11 Stettler mem restadis en Ĝenevo por kunlabori en la U.-oficejo, ekde 1910/11 kiel vicdirektoro sub Hodler. La berna juristo impresis priskribis la situacion, kiun li trovis surloke, en sia monografieto supre menciita. Jen kelkaj impresoj de Stettler:




UEA-oficejo en Ĝenevo en 1910 (supre) kaj 1923 (sube)



„Por tia entreprenego dekduo da oficistoj estus ĝuste sufiĉintaj. Kion mi trovis alveninte en Ĝenevo por helpi Hodler-on? Ĉambrokoston malgrandan, je ordo kaj pureco en miaj okuloj dubaj, kun kelkaj krudaj abiaj tabloj kaj bretaro laŭlonge de unu muro. Ĉe la fenestro Hodler; unu oficisto rusa, inteligenta kaj malordema; en la malantaŭa fundo du pliaj samideanoj, ne forigeblaj eternaj vizitantoj, kiuj per ĉiama babilado supozeble kredis inspiri la oficejon. (...) Kelkajn monatojn poste, en Rue de la Bourse, la oficejo jam aspektis pli oficeje, dank’ al skribmaŝino, malnovaj mebloj donacitaj kaj novaj bretaroj nepentritaj. La malfermo konsistis en plenkora ridego pri komercvojaĝisto nin honoriganta je sia vizito la unuan tagon: la malfeliĉulo tiom serioze kaj elokvente rekomendis ferajn monŝrankojn en ĉiuj grandoj, garantiitaj per atestoj de bankoj. ke li ne ekkomprenis nian ĝojon. Alvenis pliaj oficistoj, bonaj kaj malbonaj, honestaj kaj aliaj, ĉiam tre malalte pagitaj, ĉiam nesufiĉaj laŭ nombro. Laboris ili, laboregis Hodler, tamen

la tro bela konstruaĵo estus disfalinta sen la radikalaj ŝanĝoj de la organizo kaj labormetodoj, entreprenitaj kiam jam aŭdiĝis la krakado de la sursarĝitaj traboj. (...) Sed kun la grandiganta sperto ĉiam pli kreskis ĉe Hodler saĝa atento, ne entrepreni pli multe ol estis efektivebla. (...)“ (→Antologio)

U. fondiĝis sen kapitalo. En la unuaj jaroj, ĝia stabo konsistis ĉefe el studentoj diverslandaj kaj bonvolaj, kiuj akceptis plenumi por U. plej diversajn laborojn administrajn, redaktajn kaj organizajn.



Mapo de Ĝenevo kun la stratoj Bovy-Lysberg kaj Boulevard du Théâtre

Pro la malbona sanstato de direktoro Hodler, kiu ne plu povis labori en Ĝenevo, en majo 1919 la Centra Oficejo dume translokiĝis al Berno, ĉe la adreso *Museumsstrasse 14* (*Muzea Strato*), iom ekster la urbocentro. En Berno troviĝis ankaŭ la sidejoj de multaj gravaj internaciaj oficejoj. Sub tiu berna adreso aperis la *Jarlibro* de 1919 kaj 1920. En la *Jarlibro* de 1919 eblis legi la sekvan raporton: „La jaro 1918 estis por U. ankoraŭ pli malfacila ol la antaŭaj. La materiaj baroj, kiuj dum la milito tiel forte malhelpis nian agadon, pligrandiĝis: cenzo pli kaj pli severa, neregulaj poŝtkomunikoj, malpermeso de nia gazeto en kelkaj landoj. Al tio oni aldonu la kreskantan spiritan laciĝon pro la ŝajne senfina daŭro de la milito. Meze de tiuj malfacilaĵoj, la CO de U. tamen daŭrigis plenumi la taskojn, kiun ĝi asignis al si dum tiu tumulto periodo, nome: servi kiel ligilo inter la diversnaciaj fidelaj samideanoj kaj laŭpove

helpi al la militviktimoj... La jaro 1919 estos dediĉata ĉefe al rekonstruado...”



Borsa strato 10 en Ĝenevo (fotis A. Künzli)

Multo en U. dependis de la obstina, persista karaktero de Hodler mem. Malgraŭ firmaj konvinkoj pri la utileco kaj taŭgeco de la nova organizo, Hodler estis persekutata ankaŭ de duboj, lin kelkfoje forlasis la kuraĝon. En sia libro pri Hodler, Stettler citis lin el *Esperanto* (aprilo 1918) pri tiu temo jene: „Ni spertis, ke la pure predikema propragando ne sufiĉas: post nedaŭra entuziasmo multaj varbitoj forlasos nian aferon, ĉar ili ne scias tiri ian utilon el Eo.“ Precipe li direktis akran, preskaŭ sarkasman kritikon al tiuj movadaj gvidantoj, kiuj mem dubis pri la sukceso de la nova organizo. Hodler skribis, ke dum „la plimulto de la e-istoj ĝojis pri tiu nova entrepreno“, „ĉe kelkaj tiamaj gvidantoj de nia movado ĝi vekis nur tre moderan entuziasmon. Iuj timis, ke tiu nova organizaĵo sin okupos pri lingvaj demandoj; aliaj, ke ĝi volas direkti la propagandon kaj anstataŭi la ekzistantajn societojn; iuj, ke ĝi konkurencos la naciajn societojn; aliaj, ke ĝi estas kreaĵo de senaŭtoritataj junuloj (prava riproĉo!) ktp. Mi memoras, ke tiama ‘eminentulo’ eĉ intencis sendi al mi serion de artikoloj por pruvi, ke tia organizaĵo estas tute nebla. – Unuvorte, ni renkontis ĉe kelkaj gvidantoj tiun sa-

man rutinon, kiujn ili riproĉas al la kontraŭuloj de nia afero. Anstataŭ polemikadi, ni juĝis pli saĝe iri antaŭen kun tiuj, kiuj komprenis kaj fidis nin. Respondo per faktoj estas ĉiam pli konvinkiga ol respondo per teoriaj artikoloj.“



Museumsstrasse 14 en Berno, kie en 1919 situis la oficejo de UEA (fotis A. Künzli)



Malantaŭa flanko de la domo Museumsstrasse 14. Ĉi tiu domo estis konstruita en 1896 kaj estas konsiderata kiel protektinda konstruaĵo (fonto: Bauinventar der Stadt Bern; fotis A. Künzli)

Post la multe tro frua morto de Hodler la 31an de marto 1920 U. heredis de lia vidvino Emilie Hodler-Ruch la rajtojn je la revuo *Esperanto* kaj je la biblioteko kaj ricevis valorpapirojn en alteco de 175'000 svisaj frankoj (malpli la imposto kaj honorario por la advokato restis efektive 125'000 fr.). Tiu sumo estis sufiĉe granda kiel kapitalo por

sekurigi la estontecon (la tiama kotizo por Membro-Jarlibro estis 2,50 frankoj), kiel oni esperis. En 1920, Stettler, kiu estis taskita administri la heredaĵon de Hodler kaj verki la statuton de 1920, transprenis la prezidon de U., kiun li konservis ĝis 1924 (1928-34 li denove okupis tiun oficon). Edmond Privat, malnova amiko de Hodler, transprenis la redaktadon de la gazeto, ĝis 1934. → *Hans Jakob* (1891-1967), kiu venis en 1912 al Ĝenevo kaj kiun Hodler engaĝis en 1913, ekrespondecis pri diversaj taskoj en la Centra Oficejo en strato *Boulevard du Théâtre 12* (*Teatra Bulvarado*), kie U. malfermis sian oficejon en 1920. La komenco de → Ligo de Nacioj en Ĝenevo en la sama jaro estis alloga kadro por multaj internaciaj organizoj, do ankaŭ por U. Privat prezidis U. inter 1924 kaj 1928, direktoro de la Centra Oficejo fariĝis en 1924 Hans Jakob.



Teatra Bulvarado 12 en Ĝenevo (fotis A. Künzli)

La membronombro de U. kontentige kreskadis: de 6332 en 1923 al 8265 en 1924 kaj eĉ 9424 en 1925. Inter 1927 kaj 1930 oni kalkulis iom pli ol 9000 anojn, sed poste la nombro komencis fali.

La 23an de aŭgusto 1929 U. translokiĝis al la adreso *Tour de l'Île 1* (*Insula Turo*), kie U. luis ĉambrojn, kiuj estis pli grandaj ol antaŭe.

## POR LA INDIĜENOJ



*Por la Indiĝenoj* nomiĝis bulteno en Eo eldonata de la Internacia Oficejo por la protektado de la indiĝenoj (kolorasoj). Ĝi aperis en 1923 kiel anekso al *Esperanto* (UEA).



Tour de l'Île (fotis A. Künzli)

En la ĝeneva Centra Oficejo de U. laboris pluraj svisoj en diversaj periodoj: → *William Perrenoud* (redakcio, 1919-20), → *André Schild* (administrado, 1928), → *Henri Vatré* (biblioteko, 1931-33), ankaŭ lia unua edzino → *Juliette Vatré-Baudin* (ekde 1935), → *Madeleine Stakian-Vuille* k.a.

Vokita de Hodler por labori en la ĝeneva kaj berna oficejoj (ĝis 1923) estis ankaŭ la belgo *Renaud Richez* (1889-1945). Richez laboris en la sekretario de Ligo de Nacioj, poste transiris al la Ruĝa Kruco, kie li kunlaboris kun la helpservo, kiu serĉis perditajn militviktimojn kaj e-istajn familiojn. En 1944 li reiris al Unuiĝintaj Nacioj, sed baldaŭ mortis.



Mapo de Ĝenevo kun la Place de l'Île

Du aliaj e-istoj lige kun la ĝeneva oficejo meritas apartan atenton: *Michael Wittenberg* kaj *Petro Stojan*.

Praktikinte sian profesion kiel mineja teknikisto en Ruslando, poste kiel gazet-redaktoro, kun intertempaj restadoj en Berlino kaj Parizo, Michael Wittenberg (1881-1954) ĉ. 1924 ekinteresiĝis pri Eo kaj aliĝis al U. kaj ISAE. En 1935 U. kaj ĝia ĝeneva CO invitis lin al Ĝenevo por kunlabori kun la oficejo kiel direktoro. Sed ĉar li ne ricevis la restadpermeson en tiu urbo, li reveturis al Francio. En 1940 lia familio devis fuĝi al suda Francio kaj en 1942 venis al Svislando por resti ĉi tie. (→ Blinduloj)




Julienne Baudin, Madeleine Vuille, William Perrenoud

Laŭ la listo pri oficistoj, kiu estas publikigita en *Historia Skizo 1908-1933* de Hans Jakob, inter 1926-30 laboris en la ĝeneva oficejo de U. *Petro Evstafievich Stojan* (1884-1961). Naskita en Izmail (Besarabio), sian edukon Stojan ricevis en la liceo (1900-2) kaj en la universitato de Odeso (1902-5), kie li studis natursciencojn. Eon li ekstudis en 1907, kiun

li bonege ekmastris en mallonga tempo. Antaŭ la bolŝevika revolucio en Ruslando Stojan estis aktiva membro de la ES La Espero en Sankt-Peterburgo. En 1918 li forlasis Ruslandon kaj ĝis 1925 laboris kiel instruisto (de matematiko) en Serbio. Sekvis lia kunlaborado kun la U.-oficejo en Ĝenevo, i.a. kiel kunredaktoro de la revuo *Esperanto*. En 1929 povis esti eldonita lia impona *Bibliografio de Internacia Lingvo* fakte dank' al subvencio de →IALA. Stojan havis fortajn vortarajn kaj interlingvistikajn interesojn, kaj ankaŭ la reformoj en la lingvo Eo neniam lasis lin trankvilaj. Ĝenevon li forlasis en la direkto de norda Francio, poste li migris al suda Francio, kie en Nico li mortis pro suicido en 1961.



Robert Kreuz kaj Petro Stojan



Michael Wittenberg kaj Henri Vatré

1923-33 aperis *Bulteno de ILO* (Internacia Labor-Oficejo) kiel aldono al la revuo *Esperanto*. Tiu sukceso estas dankinda al Albert Thomas (1878-1832), franca politikisto socialista, ministro pri armado (1914-16) kaj varma amiko de Eo. En la raportoj pri la

agado de ILO plurfoje estis citataj la valoraj servoj plenumitaj de la delegitoj de U. al ILO.



Gvidantoj de UEA en 1932, fotitaj en Tour de l'Île en Ĝenevo. Sidantaj de maldekstre: Edmond Privat (sviso), Paul Blaise (anglo), Hans Jakob (germano/sviso), Eduard Stettler (sviso); starantaj: Johannes Karsch (germano), O. Sklenčka (ĉeĥo), Rudolf Hromada (ĉeĥo), Fritz Rockmann (germano) kaj L. Poncet (franco)

La plua sorto de (la ĝeneva) U. devas esti vidata kaj komprenata en la kunteksto de la akriĝinta (financa) situacio en U. (fone de la monda ekonomia krizo kiel sekvo al la borsa kolapso en oktobro 1929 en Novjorko, kiu skuis la mondan ekonomion) kaj de la internaj organizaj kvereloj, kiuj koincidis kaj kulminis en la fama organiza disdubiĝo de la internacia Eo- movado (U.-IEL) en 1936. Ĉi-loke povas esti notitaj nur kelkaj esencaj faktoj de tiu kompleksa problemaro (kiu estas priskribita en *EoeP*, ekde p. 435).

En 1933 la germano Robert Kreuz (1894-1934), kiu en 1925 fariĝis ĝenerala sekretario de →Internacia Centra Komitato (ICK), estis



nomita apud Jakob direktoro de U. kaj konstanta ĝenerala sekretario de la UK.

En 1934 la gvidantoj de U. estis ŝanĝitaj kaj Edmond Privat kaj Andreo Cseh ne reelektitaj kiel U.-estraranoj. Pro tio ekŝiĝis ankaŭ Eduard Stettler kaj rezignis Hans Jakob pri la direktoreco. La nova estraro, prezidata de la franca generalo Louis Bastien (1869-1961) kaj la U.-direktoro Robert Kreuz (1894-1936), enkondukis rigoran ŝparpolitikon. Ĉar oni taksis la vivo- kaj entrepreno-kostojn en Ĝenevo tro altaj, la estraro de U. pensis pri translokigo de la Centra Oficejo al Londono, dum en la kazo de la biblioteko, kiu estis deponita ĉe Jakob en Ĝenevo, aperis la opinio, ke estus pli bone, se ĝi estus transdonita al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kaj ke la propaganda fako migru al Stokholmo. Jakob kun aliaj akre protestis kontraŭ tiuj planoj kaj iniciatis jurproceson antaŭ la ĝeneva juĝejo. En koncerna voĉdono pri la proponoj de la U.-estraro fare de la U.-delegitoj, 80 procentoj de la voĉdonintoj aprobis la estraran planon, sed la ĝenevanoj plu persistis kaj serĉis formalajn erarojn en la proceduro. Post kiam fiaskis repacigaj traktadoj dum la UK en Vieno en 1936, la estraro vidis neniun alian eblon ol krei novan organizaĵon. La 18an de septembro 1936 Bastien anoncis la fondon de *Internacia Esperanto-Ligo (IEL)* kun sidejo en Britio. Preskaŭ la tuta internacia Eo-movado aliĝis al la nova Ligo.



Hans Jakob en 'sia' ĝeneva oficejo

En Svislando formiĝis „provizora Komitato“ por daŭrigi la malnovan U. Hans Jakob denove fariĝis direktoro, en somero 1937 lia

oficejo trovis novan lokon en Palais Wilson, kiu ĵus estis forlasita de Ligo de Nacioj por ekfunkcii kiel rezidejo de diversaj internaciaj organizaĵoj. En 1936 nova prezidanto de U. fariĝis la sviso *Karl Max Liniger* (1901-65), komerca diplomito kaj ŝtata oficisto (financ-kaj doganministerio) en Berno kaj U.-delegito; Liniger, kiu loĝis en Ĝenevo, aliĝis al la Eo-movado en 1923/24. En 1941 kiel U.-prezidanto lin sekvis →*Hans Kürsteiner* (1885-1968), ĝis 1947. Alia e-isto en tiu kunteksto, kiu partoprenis la proteston kontraŭ Bastien, nomiĝis *Ernest Hediger*, movadano de 1915. Li deĵoris kiel oficisto ĉe la latva legacio en Romo (1922-23), estis oficisto de la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo, kie li redaktis ĝian bultenon en Eo.




Jakob, Karsch, Stettler en UK 1933

La nova mondmilito preskaŭ tute ĉesigis la U.-agadon en Ĝenevo, sekve la ĝeneva U. fermis sian oficejon en 1942 kaj reaktiviĝis nur post la militfino. Funkciigita estis fakte nur la t.n. E-ista Interhelpo, kiu estis starigita unuavice por subteni viktimojn de la nacisocialismo kaj de la milito, poste por organizi la serĉadon de perditaj e-istoj (de la sendado de nutraĵoj povis profiti i.a. ankaŭ la zamenhofa familio).

Reagoj de la publiko pri la movada dramo ne mankis. Kvankam la U.-IEL-krizo tute ne havis svismovadan kaŭzon, ekzemple la franca literaturisto Gaston Waringhien (1901-91) trovis sufiĉe sarkasmajn vortojn pri la ĝenevaj akuzintoj. Li riproĉis al ili „obstinan negativan volon“, ke ili simbolas ian svisan misiemon, karikaturo de la hodleraj inten-

coj, pli gravaj ol la financa resaniĝo de la asocio kaj tiel fakte kulpigis ilin pro la movada krizo. *Svisa Espero* raportis, ke ankaŭ la bulteno *Belga Esperantisto* kritikis la svisojn, nomante ilin ĉikanistojn, kaj *Heroldo de Esperanto* eĉ denuncis ilin kiel reakciulojn, disigulojn, hieraŭulojn, kiuj „malhelpas ĉiun progreson”. En pritema komento „laŭ vidpunkto neŭtrala” en *SE* (n-ro 1/1937) → *Hans Kürsteiner*, kiu 1942-47 prezidis la malnovan U., ja konfesis, ke en la ĝeneva oficejo ekestis ia malordo kaj alvokis ĉiujn nepre respekti la validajn regularojn. La aŭtoro firme defendis la ĝenevanojn kaj rifuzis la riproĉon, ke la movada kaoso estiĝis pro la volo kaj intenco de la svisoj; samtempe li kritikis la rezignemon de la prezidanto Stettler kaj la fondon de IEL. Kürsteiner opiniis, ke la sidejo de U. devus resti daŭre en Svislando, ĉar ĝi estus politike pli sekura ol en la najbaraj landoj.

Diversaj sinpravigoj estis daŭrigitaj en la Eo-gazetaro. La IEL-revuo *Esperanto Internacia* publikigis en sia naŭa numero de 1937 sub la titolo ‘Unueco estas forto’ kontribuon kun asertoj kaj respondoj lige kun la organizaj perturboj en U./IEL, por provi klarigi la situacion al la membroj.




Karl Max Liniger kaj Hans Kürsteiner

Ĉar la organiza dueco de la Eo-movado ne estis kontentiga, la unua etapo en la reunuiga procezo estis enkondukita per la interkonsento de Berno de julio 1946. Ĉi tiu interkonsento inter ambaŭ organizoj kondukis fine al la kontrakto de la 28a de aprilo 1947, kiu antaŭvidis la reunuigon respektive kunfandiĝon de IEL kaj U. Tiu evento denove ne povis

okazi sen la aktiva kunlaboro de Jakob, Kürsteiner kaj la perado de Edmond Privat, kiu tiam estis retiriĝinta al Tiĉino kaj reaperis en esperantujo nur post la dua mondmilito post la berna UK, en kiu li helpis trovi solvon de la movada dueco inter U. kaj IEL.

Sekve estis starigita, apud la Administra Centro en Britio, la t.n. Serva Centro en Ĝenevo, kaj Jakob estis taskita estri ĝin, redakti la asocian organon *Esperanto*, prizorgi la U.-bibliotekon, daŭrigi la Bibliografian Servon, registri la aperintajn verkojn kaj kolekti ĉiujn dokumentojn pri Eo.

Kun la reunuigo de U.-IEL kaj la ĉeso de la U.-prezidanteco de Kürsteiner en 1947 oni konsideras, ke la svisa periodo de U. estis finita, kvankam iuj servoj daŭre estis plenumitaj en Ĝenevo. Sekvis la brita (ĝis 1956) kaj la nederlanda.



Edmond Privat kaj Hans Jakob

En la 1950-60aj jaroj la konfliktoj inter Hans Jakob kaj U. sub prezidanto Ivo Lapenna (1964-74) trovis novan dimension, kiam la diskutoj nun koncernis kontraŭdirojn en la librotenado de la ĝeneva oficejo kaj rilatis al la Biblioteko Hodler.

Kontraŭ „gravaj misprezentoj” Jakob publikigis detalan sindefendon en ‘sia’ *Bulteno de l’Internacia Esperanto-Oficejo (Esperanto)* en 1965 (n-ro 3) kaj 1966 (n-ro 4). Jakob firme refutis la riproĉojn kaj akuzojn, kiujn s-roj Woessink, Sturzenegger kaj Lapenna lanĉis kontraŭ li lige kun la nomitaj aferoj. Aliflanke U. publikigis en sia revuo (*Esperanto* 5/1966) mallongan komunikon kun jena teksto: „La advokato de U. en Ĝenevo informas, ke la 11an de marto 1966 la esplor-

juĝisto kulpigis s-ron Hans Jakob pro mallojala administrado kaj, alternative, pro misuzo de konfido.”

Dum Jakob rapide kadukiĝis kaj serioze malsaniĝis, iom post iom la bibliotekaj restaĵoj el Ĝenevo povis esti transsenditaj al Roterdamo, kie la Centra Oficejo situis ekde 1955. (→Bibliotekoj)

En ĉi tiu artikolo povas esti aluditaj nur kelkaj principaj punktoj de la svisa periodo de U. kaj de la konflikto inter Jakob kaj U. Pli profunde eblas legi pri tiuj problemoj ekzemple en *Esperanto en Perspektivo* (UEA 1974) aŭ en grava studo verkita de Ziko Marcus Sikosek pri *Libroj kun Asocio, La historio de Biblioteko Hector Hodler* (UEA 2004). Detalajn sciigojn pri la evoluo de U. en la komenca periodo de ĝia ekzistado provizas krom la revuo *Esperanto* mem precipe ankaŭ la jam menciita *Historia Skizo de UEA 1908-1933*, kompilita de Hans Jakob.

#### **UEA-prezidantoj de la svisa periodo:**

1908-16: Harold Bolingbroke Mudie (Britio)  
1916-19: vakis  
1919-20: →Hector Hodler (Svislando)  
1920-24: →Eduard Stettler (Svislando)  
1924-28: →Edmond Privat (Svislando)  
1928-34: →Eduard Stettler (Svislando)  
1934-36: Louis Bastien (Francio)  
1936-41: Karl Max Liniger (Svislando)  
1941-47: →Hans Kürsteiner (Svislando)

#### **Svisaj ĉefdelegitoj de UEA:**

1934-36: →Hans Kürsteiner  
1938-68: →Otto Walder  
1968-aŭg. 1979: →Kurt Greutert  
1980-85: Florence Côte-Cool  
1986-92: Niklaus Weiss  
1992-2002: →Sonja Brun  
2002-: François Randin

#### **Datrevena simpozio en Ĝenevo (1998)**


Precize en la samaj tago kaj urbo, en kiuj UEA estis fondita antaŭ 90 jaroj, okazis la 28an de aprilo 1998 en la Palaco de Nacioj en Ĝenevo datrevena simpozio pri la temo

‘Lingvo kaj Homaj Rajtoj’. La kunvenon, kiu estis sub la aŭspicio de UN-Komisiono pri Homaj Rajtoj (UNCHR), ĉeestis kvardeko da partoprenantoj. La simpozio membris krom la 90-jariĝo de UEA ankaŭ la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La Alta Komisiito Mary Robinson sendis salutmesaĝon al la simpozio. Alvenis reprezentantoj de la organizaĵoj Civitanoj de la Mondo, Federacio por studo de monda estonteco, Federa Unuiĝo de eŭropaj nacioj kaj SERVAS. La enkonduka prelego de prof. Humphrey Tonkin (Usono), kiu prezidis la simpozion, traktis lingvajn kaj homajn rajtojn el historia perspektivo. Prof. Lee Ĉong-Yeong (Sudkoreio) prelegis pri la lingvaj rajtoj kiel fundamento de la homaj rajtoj. La aliaj prelegantoj estis prof. Christoph Pan, direktoro de Sudtirola Instituto pri etnaj grupoj en Bozen/Bolzano (Italio); d-ro Fernand Varennes, direktoro de Azia kaj Pacifika Centro por homaj rajtoj kaj prevento de etnaj konfliktoj; krome ĉeestis Claude Piron, Mark Fettes kaj aliaj e-istoj. Flanke de UN-instancoj vizitis la kunvenon prof. d-ro hab. Zdzisław Kędzia, supera konsilanto al la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj, kaj Cecilia Thompson el la UN-Oficejo pri Homaj Rajtoj. Estis ellaborita dokumento kun konkludoj kaj rekomendoj. (vd. *Esperanto*, junio 1998).

#### **Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (ICK)**

Kiam en 1921 la laboristaj e-istoj (SAT) apartiĝis de la resto de la Eo-movado, aperis la ideo pri la neceso kunigi la fortojn de la ‘neŭtrala’ aŭ ‘oficiala’ Eo-movado, nelaste ĉar →Ligo de Nacioj devis difini sian starpunkton pri Eo. En la Kontrakto de Helsinki, akceptita okaze de la 14a UK en 1922, estis formulita la difino de la oficiala e-ista movado, kiu konsistis el: la naciaj (aŭ landaj) societoj, la individuaj e-istoj ĉirkaŭ UEA kaj la fakaj (teknikaj kaj profesiaj) societoj. Laŭ tiu difino la naciaj societoj elektu Konstantan Reprezentantaron (KR), kiu konsistu el po unu reprezentanto por ĉiu nacia societo per voĉdona rajto proporcia al la nombro de ĝiaj membroj. La alia, samrajta partio estu UEA,

reprezentita de sia Komitato. Ambaŭ, do KR kaj UEA, interkonsentu pri elekto de Centra Eo-Komitato (poste nomata Internacia Centra Komitato /de la Eo-Movado/, ICK), kiu konsistu el ses personoj kaj kiu „zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de la movado”, i.a. organizante la kongresojn (ekde 1924), kaj publikigante la *Oficialan Dokumentaron*. La kvar ĉefaj Eo-instancoj do fariĝis Lingva Komitato kaj ĝia Akademio, KR, UEA kaj ICK (la Centra Oficejo en Parizo ĉesis funkcii en 1923). En la centran kason de ICK la naciaj societoj devis pagi kotizon, UEA kontribuis per subvencio. La prezidanto de UEA, →Edmond Privat, fariĝis en 1923 samtempe la unua prezidanto de ICK, kiu havis sian oficialan sidejon en Ĝenevo (strato Mont Blanc 11). La aliaj membroj estis Gabriel Chavet (franco), Johannes Dietterle (germano), Rudolf Hromada (ĉeĥo), William Main Page (brito), Won Kenn (ĉino). La estraro poste ŝanĝiĝis, aldoniĝis ekzemple M. Rollet de l'Isle (franco), Julia Isbrücker (nederlandano), →Eduard Stettler (sviso), Anton Vogt (germano) kaj Felix Zamenhof (polo). Ĝenerala sekretario de ICK fariĝis la pastro Andreo Cseh (rumanio), poste Robert Kreuz (germano).



ICK-oficejo en Ĝenevo. De maldekstre: Joseph R. Scherer, Robert Kreuz kaj Juliette Baudin

En la tempo de ICK okazis kelkaj gravaj konferencoj, ekzemple la internacia konferenco por komerca helplingco en Venecio, kiu estis organizita, laŭ propono de ICK, de la Itala-Svisa Komerca Ĉambro sub la patroneco de la itala ministro pri industrio kaj komerco. La prepara konferenco por interna-

cia radiotelefonia interkonsento (Ĝenevo 1924) estis same iniciatita de ICK kaj de Svisa Radio-Elektra Societo. Cetere ankaŭ la konferenco pri la instruado de Eo, aŭspiciata de la sekretario de →Ligo de Nacioj (LdN), okazis en tiu tempo (1922) en Ĝenevo. Dum pasko 1926 okazis en Locarno/TI laborkonferenco de KR, ICK kaj la Komitato de UEA. (vd. foton en *EoeP*, p. 434; *Esperanto*, marto 1926). En 1930-32 la svis-devena usonano →Joseph R. Scherer faris, kiel speciala delegito de ICK, propagandan vojaĝon tra 41 landoj kaj realigis entute 322 paroladojn.

Sub la premo de kampanjo lanĉita de la franca ĉefdelegito de UEA (kiu estis deklarita de UEA kiel malprava) en 1928 la socialisto Privat estis devigita demisii el siaj prezidaj funkcioj en UEA kaj ICK. Nova prezidanto de ICK fariĝis la anglo John Merchant, kaj prezidanto de UEA fariĝis →Eduard Stettler, kiu jam prezidis ĝin dum 1920-24.

Ĉar la agado de SAT vekis ĉe diversaj aŭtoritatoj la suspekton pro laŭŝajne tro socialisma aŭ komunisma karaktero de la Eo-movado, ICK devis distancigi sin de tiuj antaŭjuĝoj aŭ suspektoj kaj alpreni deklaron pri neŭtraleco, kio estis farita dum la 21a UK en Budapeŝto en 1929.

Sed la neŭtrala Eo-movado pli kaj pli perdis sian originan elanon. Post kiam UEA decidis draste redukti sian subvencion al ICK, la Kontrakto de Helsinki venis al sia morto dum kunveno de la KR en Parizo kaj ICK ĉesis ekzisti en 1932. La landaj asocioj proponis fondi novan internacian organizon (estis proponita la nomo Universala Federacio E-ista), anstataŭ UEA. Per la Interkonsento de Kolonjo (1933), kiu konfirmis la reprezentan rolon de UEA kiel tutmonda organizaĵo e-ista, oni trovis kompromisan solvon kun nova organiza strukturo por UEA, kiu konsistis el pli influaj landaj asocioj, aligantaj siajn membrojn al UEA. Dum la 26a UK en Stokholmo (1934) la ŝvelanta konflikto inter la gvidantoj kulminis pro la neelekto de Karsch, Privat kaj Cseh kaj pro la protesta eksigo de prezidanto Stettler kaj la forlaso de la salono far Hans Jakob. Kiel nova prezidanto de UEA estis elektita la franca generalo Louis Bastien, kiu poste fondis IEL, dum la malnova UEA daŭrigis sian agadon en Ĝenevo, organizante dummilite la t.n. E-istan In-

terhelpon. Kaj la postmilita laborista movado estis daŭrigita ĉefe de Eugène Adam (diru Lanti) surbaze de la ideoj de senklasa kaj sennacia homaro, ideoj fakte malproksimaj de la neŭtralismo, kiu estis kontraŭbatita de SAT sub la slogano „For la neŭtralismon!“, fakte jam ekde 1922 kiam aperis la samnoma broŝuro.

Okupiĝante pri la ĵus traktita periodo de la Eo-historio oni ne forgesu, ke en tiu epoko ankaŭ la Eo-movado ne restis netuŝita de la ideologioj kaj falis inter la politikajn frontojn: dum en la 1920aj jaroj ĝi estis kaptita de la historia konflikto ĉirkaŭ la bolŝevismo-komunismo (proletoj lernas Eon en Sovetunio ktp.), en la 30aj jaroj, estante verko de judo, la Eo-movado ne povis eskapi la antisemitisman, faŝisman kaj militisman sovaĝiĝon, kiu helpis al la nacisocialismo konduki la planedon en la duan mondmiliton de 1939-45, en kiu ankaŭ e-istoj, ĉar ili estis judoj, fariĝis viktimoj de la holokaŭsto. Samtempe en Sovetunio la e-istoj estis persekutataj de la stalina reĝimo, kaj nur post 1956 la Eo-movado en la izolita orienta bloko povis repreni sian laboron, sed nur sub la kontrolo de la komunista partio.

## **UNIVERSALAJ KONGRESOJ de Esperanto en Svislando**

Sesfoje okazis en Svislando la Universala Kongreso (UK) de Eo: en Ĝenevo (1906 kaj 1925), en Berno (1913, 1939 kaj 1947) kaj en Lucerno (1979).

### **1906: 2a UK, Ĝenevo**



Oficiala kongresa glumarko 1906

Laŭ la UEA-jarlibro ĉi tiun kongreson, kiu okazis inter la 28a de aŭgusto kaj 6a de septembro, partoprenis 1200 personoj, laŭ *EdEo* nur 818 el 30 landoj.

En letero al la tiama prezidanto de SES kaj prezidanto de LKK, →Friedrich Schneeberger, kiu invitis la 2an U. al Ĝenevo, L.L. Zamenhof esprimis sian entuziasmon pri la ideo inviti al la U. al Svislando kaj eĉ prognozis gravan rolon de la lando por Eo: „Kara sinjoro! Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj E-istoj decidis inviti la 2an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege!“ (→L.L. Zamenhof en Svislando)



Victoria Hall en Ĝenevo (fotis A. Künzli)

SE detale raportis pri la preparlaboroj de la kongreso, kaj la 7an de marto 1906 okazis en Ĝenevo publika kunveno, dum kiu la SES-prezidanto →Friedrich Schneeberger prezentis la 15 membrojn de la LKK, kies sekretarioj estis →Edmond Privat kaj →Hector Hodler, tiam gimnazianoj 16- kaj 18-jaraĝaj. La oficiala inaŭguro okazis en la salono de Amis de l'Instruction. Al la programaj kulminoj apartenis la laŭtleĝo de la deklaro pri la neŭtraleco de la Eo-kongresoj far la franca oficiro Gaston Moch, kongresa sekretario; vespera solena malfermo en la salonego de Victoria Hall, orgena ludado de Paul Schneeberger, frato de Friedrich Schneeberger (kongresa prezidanto), paroladoj de Edmond Privat, Théodore Renard, redaktoro de *Svisa Espero* k.a. Zamenhof, kiu unue dubis, eĉ rifuzis veturi Ĝenevon (letero al Javal de la 3a de aŭgusto), ĉar oni (precipe Javal) malrekomendis al li prelegi pri la homaranismo,

tamen aperis en la ĝeneva kongresejo. Same al Sebert Zamenhof skribis la 3an de aŭgusto: „Ĉar al mi estas ĉiam tre malagrabla ludi ian rolon oficialan, tial la konsilo de s-ro Javal ne veni Ĝenevon estis al mi persone tre agrabla kaj mi estis jam preta plenumi ĝin sub ia konvena preteksto [ekz. grava malsano]. Sed ĉar mi timas, ke mia neveno Ĝenevon povas esti tre malagrabla por la kongresanoj, tial mi petas Vin, volu ankoraŭ pripensi la aferon kaj skribi al mi, kion Vi pro la bono de nia afero konsilas al mi: a) ĉu tute ne veni Ĝenevon; b) ĉu veni, malfermi la kongreson kaj silente forveturi la sekvantan tagon; c) ĉu resti ĝis la oficiala fermo de la kongreso?“ En telegramo de la 16a de aŭgusto el Bad Reinerz, Zamenhof skribis al Sebert: „Ĉar mi timas, ke mia neveno Ĝenevon povus elvoki suspektojn pri ia malpaco inter mi kaj la organizantoj de la kongreso aŭ iajn aliajn suspektojn, tial mi decidis veni Ĝenevon. (...) Mi venos Ĝenevon la 26an de Aŭgusto (...).“ Ŝajnas, ke Javal daŭre insistis pri sia konsilo al Zamenhof neveni al Ĝenevo, kiu finfine tute konfuzis kaj jam iom ĉagrenis la majstron. La 23an de aŭgusto li tamen forveturis de Bad Reinerz en la direkto de Svislando, ne sciante kio atendos lin tie. En Ĝenevo Zamenhof do paroladis publike pri la intergenta batalado en sia ruslanda patrujo kaj pri la interna ideo de Eo. Pala staris li en la ĝeneva Viktoria-Hall, eldirante siajn frazojn per laŭta kaj decida voĉo, raportis Edmond Privat en sia biografio *Vivo de Zamenhof*. Tremiga aplaŭdego montris al li, ke la plejmulto de la kongresanoj lin komprenis kaj aprobis lian kortuŝan paroladon. Nur kelkaj malmultaj homoj kiel Louis de Beaufront opiniis, ke Eo estas aŭ povas esti nur lingvo – tial li poste transiris al Ido. Lia kulpigo kontraŭ la ‘interna ideo’ profunde vundis la koron de Zamenhof.

En Ĝenevo kuniĝis en apartaj fakkunsidoj (entute 23) i.a. ĵurnalistoj, edukistoj, socialistoj, framasonoj, katolikoj, protestantoj, pacaktivuloj, maristoj, oficiroj, ruĝkrucanoj, juristoj, komercistoj, kontraŭalkoholistoj, kuracistoj kaj farmaciistoj, muzikistoj, ŝakludistoj, stenografistoj, sciencamantoj, blinduloj.

Aliaj okazaĵoj estis: plenkunsidoj en la aŭditorio de la ĝeneva universitato (kie estis konfirmita la fondo de la Lingva Komitato kaj de

la Kongresa Komitato kaj starigita la e-ista konsula reto laŭ propono de la franco Alphonse Carles); oficiala festeno en Kiosque



L.L. Zamenhof, Friedrich Schneeberger kaj Edmond Privat en Ĝenevo



Kongresanaro en Ĝenevo



Funkciuloj Schneeberger, Privat, Hodler, Renard

des Bastions; teatra vespero en la Granda Teatro de Ĝenevo (kun ‘Marŝo de l’E-istoj’, himno de Antoni Grabowski, valso de belga verkisto, versaĵo pri la bulonja kongreso; komedieto de Max Maurex; ĉerpaĵo el ‘Dueto de Edzafesto’ de Figaro kaj deklamaĵo el Edgar Poe; teatraĵoj ‘La Floro de l’Pasinto’ de Edmondo de Amicis kaj ‘Agrabla surprizo’ de W. Frerking); kongresa balo (en Amis de l’Instruction). Krome estis organizita

ŝipekskurso sur la Ĝeneva Lago al Rolle, Laŭzano kaj Vevey, kie la solenaĵoj disvolviĝis en la hoteloj Trois Couronnes kaj hotelo d'Angleterre (aliaj ekskursoj okazis al Francio kaj Berna Oberlando). La kongresraportinto en *SE* bedaŭris, ke la ĝeneva registaro ne salutis oficiale la kongreson. La duobla numero septembra-oktobra de *SE* aperigis detalan raporton pri la 2a U., kaj Edmond Privat dediĉis apartan ĉapitron al la ĝeneva kongreso en sia *Historio de Lingvo Esperanto*.



La Kazino en Berno

### 1913: 9a UK, Berno



Oficiala kongresa glumarko de la UK 1913

Ĉi tiu kongreso okazis en la berna Kazino inter la 24a kaj 31a de aŭgusto kun 1203 partoprenantoj (laŭ la UEA-jarlibro), resp. 1015 (*EdEo*) el 30 landoj. Membroj de LKK estis: →Jakob Schmid, prezidanto; →Immanuel Olsvanger, sekretario; Fritz Merz, financa komitato; →Jules Perlet, loĝado; Charlotte Pulvers, kongreslibro; Max Burghold, distro, polico. La honorofico de la alta protektanto resp. prezidanto de la honora komitato estis plenumita far kolonelo →Emil Frey, eksa membro de la svisa registaro kaj oficanta direktoro de la centra oficejo de la Universala Telegrafa Unio. Lia germanlingva kongresa alparolado, kiu estis publikigita en la oficiala kongreslibro, estis laŭlegita de f-ino Lina Häberli en Eo-traduko. Ĉi tiu parolado estis publikigita ankaŭ en la naŭa numero de la periodaĵo *Die Weltsprache*, organo eldonita de la svisaj idistoj, kiuj en 1913 anoncis la fondon de *Weltsprache-Verein Bern*. (→Antologio)

L.L. Zamenhof partoprenis la kongreson, sed jam anticipe rezignis pri la kongresa parolado, deleginte la taskon al →René de Saussure, kiu deĵoris kiel prezidanto de la kongresa akcepta komitato. Zamenhof entute dubis ĉu necesas organizi tiun berna kongreson. Al Sebert li skribis la 30an de decembro 1912, surbaze de iu letero de SES, kiu evidente atentigis pri la ekzisto de kontraŭ-esperantaj agantoj (idistoj):

„Mi iom timas, ke aranĝi tro rapidigite kongreson en Berno, kie ni havas influajn kontraŭulojn, estus eble afero tro danĝera, tiom pli, ke la iom lacaj kaj malagrablaj surprizitaj e-istoj eble ne venos en sufiĉa nombro kaj la organiza demando verŝajne denove ne estos sufiĉe pretigita. Konsiderante la maloportunajn cirkonstancojn, en kiuj devos esti organizata la kongreso, ĉu Vi ne trovas, ke eble estus pli bone, se ni en tiu ĉi jaro *tute ne* kongresus? Ĉu ne estus pli bone fari ripozon kaj kolekti pli grandajn fortojn kaj pli grandan entuziasmon por la *Pariza* kongreso? Estas vero, ke, se ni nun ne kongresos, tiam la Pariza kongreso ne povos esti jubilea (X-a), sed ĝi estos nur la 9-a; sed tio havas nenian signifon. Ĉu en Krakovo oni sentis multe la jubilecon? Ne.“ (Pro la militeksplozo la pariza kongreso ne okazis kiel planite respektive estis malokazigita). Efektive la idistoj provokis skandalon rando de la berna kongreso. Oni eksciis, ke la idistoj intencis saboti la mondkongreson, sendante leteron al la aŭtoritatoj de la ŝtato, kantono kaj urbo kun la alvoko, ke oni rezignu sendi oficialan reprezentanton al la U.

La skandalo fariĝis publika, ĉar la letero estis submetita al la prezidanto de la kongreso, Schmid, kiu okupiĝis pri la afero. En la kongresejo cirkulis bildkarto kun sarkasma karikaturo. (→Ido en Svislando, →Jakob Schmid)



Kongresa karto de la UK 1913

Krom tio paroladis reprezentantoj de la kantona konsilantaro kaj de diverslandaj registaroj. Aliaj okazaĵoj: tri laborkunvenoj de UEA sub la gvido de Théophile Rousseau, kiu anstataŭis la UEA-prezidanton Harold Bolingbroke Mudie, kaj de →Hector Hodler, ĝenerala direktoro de UEA. Kiel en la U. de 1906 ankaŭ en Berno okazis diversaj fakkunsidoj. Antaŭ la Svisa Federacia Palaco oni kantis la svisan nacian himnon en la Eo-traduko de →Immanuel Olsvanger. En la teatra vespero estis surscenigitaj *Patreco* de Mathilde Wolf kaj *Ginevra* de →Edmond Privat. Okazis ankaŭ muzika kaj literatura vesperoj, internacia oratora konkurso (sub la prezido de →Jean Wenger), granda koncerto kaj granda kongresbalo, kiel ankaŭ festo sur la monto Gurten, tri Eo-diservoj por protestantoj, katolikoj kaj judoj, ekskurso al Berna Oberlando.



Funkciuloj Frey, de Saussure, Schmid, Pulvers



UK en la berna Kazino en 1913

### 1925: 17a UK, Ĝenevo

Ĝi okazis por la dua fojo en Ĝenevo inter la 31a de julio ĝis 7a de aŭgusto kun 953 partoprenantoj. Kiel kongresa akceptejo servis Bâtiment Electoral en strato Général Dufour. La solena malfermo de la kongreso en Victoria Hall estis akompanita de →Eduard Stettler, honora prezidanto de UEA, kaj de →Edmond Privat, prezidanto de UEA kaj ICK. La solena inaŭguro de la Somera Universitato en Eo disvolviĝis en la universitata aŭditorio kun paroladoj de →Pierre Bovet kaj Théophile Cart. Aliaj kunsidoj de la Somera Universitato i.a. kun →Charles Baudouin okazis en la kemia lernejo (bv. des Philosophes 22), komerca lernejo (strato Général Dufour 2) kaj en la Palaco de →Ligo de Nacioj.



Gravuloj Bovet, Baudouin, Stettler, Privat



Estis organizita vizito al la Laboroficejo de Ligo de Nacioj. Kunsidoj de UEA okazis en la Centra Oficejo de UEA (bv. du Théâtre 12). La balo disvolviĝis en Bâtiment Electoral, solena memorfesto al Zamenhof en Victoria Hall. Diservoj katolika kaj protestanta estis aranĝitaj en la preĝejo Notre Dame resp. en la katedralo St-Pierre. Ŝipekskurso estis farita sur la Ĝeneva Lago kaj alia ekskurso al Chamonix en Savojo (Francio).



Kongresa karto kaj la titolo de la Kongresa Bulteno, UK Ĝenevo 1925



Afiŝo por la Somera Universitato dum la UK 1925

### 1939: 31a UK, Berno

Post la aliĝo de SES al IEL en 1938 Berno estis bonvena kiel kongresurbo por la 31a U. en 1939, kiu okazis en la Kazino inter la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto, unu jaron pli malfrue ol planite de la svisaj e-istoj (la svisa registaro jam estis skribe konfirminta la kongreson en februaro 1937 por la jaro 1938). La rajto je la gvidado de la U., al kiu malgraŭ la streĉita politika tempo aliĝis preskaŭ 800 (oficiale 765) personoj el 25 landoj (sen germanoj kaj ĉeĥoj), devis esti rezervita ekskluzive al IEL. Kiel kongresejo servis denove la Kazino, kiel en 1913. La ĉefaj funkciuloj de la kongreso (LKK-anoj) estis krom Bastien kaj →Jakob Schmid, honora prezidanto de LKK kaj prezidanto de la SES-ĉefgrupo en Berno, ankaŭ d-ro H. Buchli, direktoro de la oficiala trafikoficejo; →Otto Walder, kiu tiam loĝis en Berno kaj estis novulo en la movado, estis vicprezidanto de SES kaj ĉefdelegito de IEL en la kongresa jaro; Martin Ardüser, studento de la berna universitato, estis dua LKK-sekretario (→Berno). Aliaj LKK-anoj nomiĝis: d-ro W. de Lerber, J.F. Portmann, delegito de la urbo Berno, G. Merz, A. Hilfiker, Bruno Meyer, M. Budliger kaj A. Pfister. La alta protekto estis transprenita de la svisa poŝt- kaj fervoj-ministerio, kiu vidis en la kongreso unuavice kontribuon al la akcelo de la turismo en Svislando. La federa konsilisto (ministro) Marcel Pilet-Golaz (1889-1958) mem ne povis ĉeesti pro malsano kaj estis anstataŭita de persona reprezentanto kaj de la prezidanto de la berna kantona registaro (Dürrenmatt), kiu salutis la kongreson.



Oficiala kongresa glumarko de la UK 1939



La Kazino en Berno – kongresloko en 1913, 1939 kaj 1947



Funkciuloj Schmid, Walder, Ardüser, Baur

La teatra vespero ne okazis pro manko de mono. 250 personoj partoprenis la ekskurson al la monto Jungfrauoj, aliaj al la alpaj regionoj de Blausee, Schwarzsee, monto Chasseral, pasejoj Pillon, Grimsel, Furka k.a. La postkongreso okazis en Herzberg/AG. La berna gazeto *Der Bund* raportis ĉiutage pri la kongreso. La informservon de la kongreso gvidis 24-jara universitata studento, posta ĵurnalisto kaj ekaktiva SES-ano: →Arthur Baur (\*1915), ĉefredaktoro de la →*Svisa Antologio* (1939), grava kultura kontribuado aperinta en la kongresa jaro kaj vendata al la kongresanoj en Berno.



Titoloj de la *Kongresa Bulteno*, Berno 1938 kaj 1947



#### 1947: 32a UK, Berno

La unua postmilita U. kun 1370 partoprenantoj disvolviĝis de la 26a de julio ĝis la 1a de aŭgusto denove en la berna Kazino, por la tria fojo. La kongresa oficejo trovis sian lokon en la ĉefa stacidomo. La interkonatiĝa vespero efektiviĝis en la restoracio Kornhauskeller. Al la LKK apartenis: d-ro H. Buchli (prezidanto), trafik-direktoro de Berno; →Jules Gilliard, →Otto Walder, W. Streun, O.T. Nicolaisen, E. Kaiser, A. Schweighauser, A. Hilfiker, H. Rufert, H. Mollet, →Hanni Fischer-Buri, H. Küttel, C. Jaccard kaj →Arthur Baur (gazetara servo). La alta protektanto nomiĝis d-ro Enrico Celio (1889-1980), vicprezidanto de la Svisa Konfederacio (li estis reprezentita de la federacia konsilisto Eduard von Steiger). La kongreson antaŭis kontrakto de la 28a de aprilo 1947 surbaze de la Interkonsento de Berno de julio 1946, kiu antaŭvidis la reunuigon respektive kunfandiĝon de IEL kaj UEA. La unua prezidanto de la reunigita UEA fariĝis Ernfrid Malmgren (1899-1970). Per la alvokoj de 1946/47 la movada disdubiĝo estis venkita kaj la proceso kontraŭ Louis Bastien, prezidanto de IEL, finita. Dum la berna U. koliziis diverĝaj opinioj pri la neŭtraleco de UEA. Kiam ok landaj asocioj prezentis rezolucion proponon, kiu kondamnis la krimojn de la nacisocialistoj, la propono estis rifuzita per ĉ. du trionoj de la kongresanoj. Tamen la baza

ideo de la rezolucio estis, ke UEA ne povas indiferente rilati al la ĝenerala evoluo de la internacia asocia kaj politika vivo; ĉi tiu ideo respeguliĝis poste en la statuta principaro de UEA (pri homaj rajtoj kaj neŭtraleco).




Oficiala kongresa glumarko de la UK 1947



Gravuloj Celio, Gilliard, Walder, Fischer-Buri

Dum la U. efektiviĝis kultura vespero kun la hungaraj verkistoj Gyula (Julio) Baghy, Kálmán (Kalomano) Kalocsay, Lajos Tárkony kaj Vilmos Bleier. Disvolviĝis kongresa balo, protestanta diservo gvidita de →Edouard Waldvogel, ekskursoj al la Alpoj (Schwarzsee, Niesen) kaj Ĵuraso (Chasseral). La postkongreso kondukis la partoprenantojn al Reutspierre/BE.



UK-anoj Nicolaisen kaj d-rino Wanda Zamenhof

### 1979: 64a UK, Lucerno



Kongresa glumarko kaj oficiala poŝtmarko


Ĉi tiu kongreso kun oficiale 1635 partoprenantoj el 49 landoj disvolviĝis inter la 28a de julio kaj 4a de aŭgusto en la malnova Art- kaj Kongresdomo (malkonstruita en 1996 kaj anstataŭita de moderna konstruaĵo). LKK: →Kurt Greutert, prezidanto; Peter Dietschi kaj →Ernst Glättli, vicprezidantoj; →Erna Döring, sekretariino; Heinrich Ringli, protokolisto; →Lilly Schaerer, kasistino; Johann Lutz, Gertrud Weigelt, François Mottet, →Hans Hunkeler, Martin Balsiger, István Mórocz k.a. estis membroj. La alta protektanto Hans Hürlimann (1918-94), prezidanto de la Svisa Konfederacio, mem ne ĉeestis. Al la honora komitato apartenis i.a. Hans-Rudolf Meyer (\*1922), urbestro de Lucerno inter 1967 kaj la 30a de junio 1979, kaj ano de la svisa parlamento (1962-25.11.1979); Josi J. Meier (\*1926), same membrino de la nacia konsilantaro (1971-83) kaj prof. d-ro Anton Hänggi, episkopo de Bazelo (1967-82).

La kongresa temo traktis la lingvan aspekton de la internacia organiziĝo. Ĉeestis ankaŭ Robert Muller en la nomo de Ekosok (UN). Ĉefaj programeroj estis la Internacia Somera Universitato (ISU), kies rektoro estis →Claude Piron, esperantologia konferenco, internacia arta vespero kun prezentadoj de la svisoj →Olivier Tzaut kaj Danielle Béguin. Ekskursoj estis organizitaj al Lugano, Berno, La Chaux-de-Fonds (KCE kaj CDELI), montoj Pilatus, Rigi kaj Titlis, kaj la postkongreso okazis en Interlaken.



Gravuloj Hürlimann, Greutert, Glättli, Schaerer

Samtempe okazis la 17a Internacia Infana Kongreseto en la lucerna junulargastejo. Okaze de la U. estis eldonitaj diversaj filatelajoj, i.a. la unua svisa Eo-poŝtmarko (svisaj frankoj 0.70) kun la motivo de la unua varmaera →Eo-balono lanĉita por atentigi pri Eo kaj la kongreso. Al la kongresanoj estis distribuita la libro →*La Fenomeno Svislando* de →Arthur Baur, kiu gvidis la gazetaran servon. Ĉiuj tri lokaj gazetoj ĉiutage raportis pri la kongresaj eventoj.  
→Filatelo



Kongreslibro de Lucerno 1979 kaj la libro *La Fenomeno Svislando* de Arthur Baur



Iama Art- kaj Kongresdomo en Lucerno (fotita de A. Künzli ĵus antaŭ ĝia malkonstruo en 1996)



Turisma Eo-afiŝego dum la lucerna UK 1979



## **UNTERWALDEN**

Kantono en centra Svislando germanlingva, dividita en du t.n. duonkantonoj: Nidwalden (mallong. NW, 276 km<sup>2</sup>, 39'900 loĝantoj/2005. Ĉefurbo: Stans) kaj Obwalden (mallong. OW, 491 km<sup>2</sup>, 33'100 loĝantoj/2005. Ĉefurbo: Sarnen).

En Nidwalden komplete mankas informoj pri Eo.

Krom artikolo pri Eo en la gazeto *Obwaldner Volksfreund* (Sarnen) en 1905 kaj escepte de unusola SES-adreso en tiu regiono en 1907 kaj la mencio en *SE* 8-9/1911, ke en hotelo Sarnerhof oni parolas ankaŭ Eon (la *Jarlibro* de UEA notis tiun adreson kiel delegiton), ne ekzistas informoj pri Eo-aktivecoj en Obwalden. Ambaŭ kantonoj estas katolikaj, sociepolitike konservativaj kaj geografie iom izolitaj.



## **URI**

Kantono en centra Svislando germanlingva, (mallong. UR: 1077 km<sup>2</sup>, 35'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Altdorf.

La kantono U. estas komplete blanka makulo sur la Eo-atlaso de la svisa planlingva kaj Eo-movado, kun unu escepto: En aprilo 1959 kadre de sia svisa vojaĝo prelegis en sindikata medio de la vilaĝo Erstfeld la japana ĵurnalistino Joŝiko Kajino, kiu atingis la atenton de cent neesperantistoj kaj kvin e-istoj. Kvankam en la vilaĝo Erstfeld troviĝas grava fervoja riparejo kaj deponejo, kiu estis konata al pluraj Eo-fervojistoj, kiuj tie restadis aŭ eĉ portempe laboris, Eo-aranĝo tie evidente neniam okazis.